# starto

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1972 1


Jiří Kořínek

## *EKSKURSO AL OSTRÝ**

Ho belas mond' de sur la supro de Akrul'.
En ĉarma val' sub mi serpentas Elbo,
per farboj de oktobro pentras al okul'
la sun' sur foliar' kaj velka herbo.

Arbaraj krestoj, pintaj montoj en la rond',
profunde sube Elbon ŝip' sulkigas,
sur roko sidas mi, feliĉa vagabond',
al ventsusur' la portradi' muzikas.

Kortuŝas tiu bild' kaj ravon de la bel'
piankoncert' de majstro akompanas,
dankon al vi, naskinta min al tiu ter',
kaj Vi, laŭ kies vol' mi migras, sanas.

El urbo de haladz' kaj fumoj de labor',
en kiu mi pasigu maljunaĝon,
dankinde eblas sorĉavage fuĝi for
en ĝian enviindan ĉirkaŭaĵon.

Revenas mi laŭ pad' sur velka foliar'
de Elbo glimrubandon forlasinte,
preter la burg', sub kies nigra gardostar'
min adiaŭas tag' ĝuita inde.

* O s t r ý (Akrulo), monto apud Ústí nad Labem en norda Bohemio.

## Kampanjo "VJETNAMIO" sukcesa

La ekzemplon de EK en Ústí jam sekvis pluraj aliaj, kiuj intertempe aranĝis vesperojn de solidareco kun la batalantaj popoloj de Vjetnamio kaj la ceteraj landoj de Hindoĉinio.

Raportoj venis el urbeto Ř e v n i c e apud Praha, kie la 14-an de dec. kunvenis frekventantoj kaj instruistoj de la fundamenta lernejo por aŭskulti rakontadon de la kara gasto, k-do Pham duong, direktoro de la Informa kaj Kultura Centro de VDR en Pra-

(daŭrigo sur la 3a pĝ.)

En la pasintaj tagoj (25.-26.1. 1972 traktis en Praha la reprezentantoj de sep socialismaj landoj pri la aktualaj problemoj de paco, sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo. Oni akceptis du signifoplenajn dokumentojn : Deklaracion pri paco,sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo kaj la proklamon, en kiu estas kondamnita la usona agreso en Hindoĉinio.

La traktado antaŭ ĉio montris, ke la ĝenerala linio de eksterlanda politiko de socialisma komunumo estas en la principo ŝanĝi la eŭropan kontinenton en la teritorion de daŭra paco kaj kontribui al stabileco kaj reciproka kunlaboro en la tuta mondo.

Ĉi starigis ankaŭ normojn, laŭ kiuj devus evolui rilatoj inter la eŭropaj landoj : netuŝebleco de la landlimoj, neuzo de forto, paca kunekzistado, bonaj najbaraj rilatoj kaj reciprokaj avantaĝaj kontaktoj, la senarmigo kaj subteno de la Unuiĝintaj Nacioj.

## ALVOKO EL PRAHA

Por ĈSSR estas tre grava la subteno, kiun la aliancaj landoj donas al nia justa postulo je la normaligo de la rilatoj kun GFR,kondiĉe, ke ĝia registaro agnoskos la senvalidecon de la munkena kontrakto ekde ĝia komenco.

Ni, esperantistoj,kiuj sentas nin kiel naturaj amikoj de paco kaj ties defendantoj, povas kun sincera ĝojo bonvenigi la rezultojn de la traktadoj en Praha. Ni ja konscias, ke la ideo de la Internacia Lingvo,kiel rimedo de interkompreniĝo de la popoloj,povas kreski kaj flori nur en pacaj kondiĉoj. Tiujn strebas krei la deklaroj de la kunsido, kies realigon ni ĉiuj klopodu laŭ niaj fortoj ĉiamaniere subteni. (sv)

## PŘÍLIŠ MNOHO POLITIKY?

Posteskl si nedávno jeden český esperantista, že bychom se měli věnovat esperantu a méně "politizovat", protože to prý dnes už netáhne.

Lze s touto námitkou souhlasit ? Měli bychom skutečně "chránit" mezinárodní jazyk před vlivem společnosti, v jejímž lůně se má rozvíjet ? Uveďme příklad : možná už v tomto roce se sejdou zástupci všech evropských národů, aby jednali o problémech bezpečnosti našeho kontinentu. Význam takového setkání sotva někdo z nás může popřít ; jeho cíl je koneckonců totožný nebo velice blízký cílům stoupenců mezinárodního jazyka.

Díky iniciativě své socialistické části začíná Evropa stavět mosty politické, hospodářské a kulturní spolupráce, a bude k tomu postupně využívat všech možností.

Jedině v takové atmosféře se může dařit i mezinárodnímu jazyku.

Starosti naší i celé evropské společnosti se tedy citelně dotýkají i onoho malinkého společenství,jež nosí ve štítě zelený pěticípý symbol - i když přitom zákonitosti společenského vývoje jeho úsilí zatím příliš nerespektují.

Tato velká společnost si rovněž vezme od nás jen to, co bude potřebovat, a ne to, co by z našeho hlediska bylo vhodné. Záleží však na nás, k o l i k jí z toho mála dokážeme dát.

Obhájce "čistého", "panenského" esperantismu možná v duchu zaprotestuje : ale naše hnutí je přece odjakživa neutrální !

Měl by se poučit alespoň z historie,domnívá-li se, že "politizování" mezi esperantisty je teprve "vynálezem" poslední doby. Jak by si asi vyložil toto ? :

> "Nikterak nenahlížíme svoji příslušnost k esperantu jako jařmo,které by každého nutilo mlčet o nepravostech a zaslepeně řečnit o bezpochyby krásné představě : sbratření národů. Je nezbytné přijmout život jaký je a neuzavírat se do nějakého kruhu, kde bychom byli zbaveni povinnosti cokoliv vědět o realitě".

Tak vida, už před šedesáti lety - neboť z roku 1912 je tento apel určený českým esperantistům - nepovažovali u nás esperanto za jakousi skleníkovou rostlinku, ani se neobávali,že by mohlo uhynout pod mrazivým dechem staříčké monarchie. Jak vnímavě naslouchali naši předkové hlasu své doby, jak byli moderní !

Tím spíše je dnes nemoderní český esperantista,který se v dobré víře domnívá o spásonosném poslání jazyka, aniž by se pokoušel všude a všemi způsoby dokázat , jak veleznamenitý nástroj má ve svých rukou. (knl)

SET 20 JAROJ LANČOV

**1972**

| | |
|---|---|
| SEMINARIO | 9.-15.7. |
| 1-a ETAPO | 16.-29.7. |
| 2-a ETAPO | 30.7.-12.8. |

Jako obvykle, uspořádá Klub esperantistů v Třebíči i letos seminář pro funkcionáře esperantských klubů a kroužků a Letní esperantský tábor ve dvou etapách.

Seminář bude rozdělen na část naukovou a pracovní. V části naukové budou posluchači seznámeni s moderními učebními metodami a pomůckami, novými písněmi a hrami, budou vysvětlovány těžší partie gramatiky a budou blíže obeznámeni se strukturou ČES, ZE SSR a UEA. V pracovní náplni budou dobudovány nová kuchyně a hygienická zařízení. Odpoledne budou věnována koupání, vycházkám a sportům. Večery prožijeme u táborových a besedních ohňů. Přednášet budou význační činitelé esperantského hnutí. Počet posluchačů semináře je omezen. Cena pobytu pro nevýdělečně činné je 150.- Kčs, pro ostatní 200.- Kčs.

Ubytování bude ve stanech po dvou osobách a menšího počtu účastníků v prosté chatě a chatkách. Každý účastník je povinen dodržovat táborový řád. Účastníci běhů jsou povinni navštěvovat pravidelně některý z kursů esperanta a podrobit se závěrečné zkoušce. Kursy budou rozděleny na skupiny: A - začátečníky, B - pokročilé, C - konversační a D - pro kandidáty učitelství.

V programu každého běhu je celodenní výlet s prohlídkou zámku v Jaroměřicích nad Rokytnou s jeho obrazárnou a muzea Otokara Březiny, jedinečného stavitelského skvostu ve střední Evropě,

----------------------zde odstřihněte----------------------

P Ř I H L Á Š K A

Jméno a příjmení: ______________________

Zaměstnání: ____________ Datum narození: ____________

Hlásím se do ____ běhu, skupina ______

Podpis rodičů u uchazečů mladších 18 let: ______________________

Svým podpisem beru na sebe dobrovolně povinnost řídit se táborovým řádem.

Podpis uchazeče: ______________________

Potvrzujeme, že ______________________

byl/a/ přijat/a/ do ____ běhu LET a že zaplatil/a/ částku ________ Kčs jako zálohu na táborový poplatek.

V Třebíči dne: ____________

Vedoucí LET: ____________

basiliky v Třebíči, zámku v Náměšti nad Oslavou, známého výstavou goblénů a památníku slavné Bible Kralické v Kralicích, výlety na zámek Vranov a na hrad Bítov. Pro obě etapy je zajištěna účast ze zahraničí.

Poplatek je odstupňovaný, kdo se přihlásí a zašle zálohu do:

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 15.3. | člen ČES, | ZE SSR | 400/350/ | nečlen ČES, | ZESSR | 430/380/ Kčs |
| 15.6. | -"- | -"- | 420/370/ | -"- | -"- | 450/400/ Kčs |
| po 15.6. | -"- | -"- | 440/390/ | -"- | -"- | 470/420/ Kčs |

Částky uvedené v závorkách platí pro mládež od 10 do 15 let.
V příspěvku je započítáno kursovné, ubytování ve stanu nebo chatě a strava, která se podává pětkrát denně.
Přihláška je platná až po složení zálohy nejméně 150.- Kčs. Doplatek nutno vyrovnat při nástupu do tábora. Příjem zálohy potvrdíme současně s oznámením o přijetí. Přijati mohou být pouze účastníci starší 12 let a na celý běh. Odhlásí-li se účastník nejpozději 14 dní před zahájením tábora, bude mu polovina zálohy vrácena. Na pozdější odhlášky nemůže být brán zřetel a záloha propadne.
Bližší informace podá a přihlášky na požádání zašle:

Klub esperantistů, místní skupina ČES v Třebíči, pošt. schr. 72

Upozorňujeme začátečníky na intenzivní A kurs! Vedle normálních kursů pro začátečníky hodláme zřídit kurs vhodný zvláště pro ty, kteří nemají možnost zdokonalovat se v některém z klubů /kroužků/. V tomto kursu bude vysvětlena gramatika z celé učebnice. Absolvent kursu se snadněji jazyku doučí.

Nabízíme Vám učebnice pro začátečníky i pro pokročilé podle kterých se v táboře bude vyučovat. Jsou to:

ABC mezinárodního jazyka esperanta od Th. Kiliana á 6.- Kčs
LMR La Mondo Rakontas, mezinárodní čítanka Th.Kiliána á 8.- Kčs
Při odběru nejméně 10 ks poskytujeme jedenáctý výtisk zdarma.

Máme na skladě i zpěvníky J. Cinka /2. část/, kterých se používá v hodinách zpěvu. Cena 5.- Kčs.

Dále Vám můžeme nabídnout odznaky s nápisem Lančov á 5.- Kčs a několik druhů dopisnic s námětem tábora.

Tuto přihlášku a potvrzení, doplněné jménem a částkou zašlete na adresu:

Klub esperantistů,
místní skupina ČES,

pošt. schránka 72
T ř e b í č

ha pri la vjetnama infanaro. La alia kunveno okazis en Radotín 1.2.72.
Ĉirkaŭ sesdek ĉeestantoj en la klubejo de Esperantista Klûbo en P r a h a aŭskultis 25.1. la prelegon de Tomáš Balda, laŭreato de la Ĉs.pacpremio. Okazis samtempe monkolektado. Raportis pri la okazintaĵo "Večerní Praha" kaj "Práce".
La saman tagon okazis vespero de solidareco en EK B r n o, kiun ĉeestis ankaŭ la reprezentanto de la vjetnama kulturcentro.
La infanoj de la fundamenta lernejo en M ě l n í k, Jungmannovy sady organizis kolekton de infan-ludiloj,kies rezultoj jam estis transdonitaj al la ambasado de VDR. Ili plue aranĝis ekspozicion de la vjetnamaĵoj en sia lernejo, filmprezentojn pri la heroa lando kaj la ampleksan monkolektadon. Pri sia agado oni vaste informis la gazetaron per pluraj artikoloj.
La 6an de dec. la esperantistoj en V s e t í n okazigis vesperon pri Vjetnamio kune kun ekspozicio de vjetnamaj libroj, kiu alportis financan profiton al la konto de la kampanjo.
En P l z e ň oni projekciis enkadre de la Monato de ĉs.- sovetia amikeco la filmon "La lando, kiun mi amas". Libervola enirpago estis dediĉita al la sama konto.
La pluaj vesperoj estas okazintaj en Cheb, Boskovice, Kyjov,Ostrava, Polička, Radotín, Šumperk, Veverská Bitýška kaj preparataj en la aliaj lokoj. /knl/

## Esperantista triumfo en Martin

Entute 56 premioj kaj 74 honoraj rekonoj estis aljuĝitaj ĉe la internacia konkurso de la infana arta kreaĵo en Martin, kie pasintjare okazis internacia ekspozicio sub la devizo "Por la paco kaj feliĉa vivo de la infanoj de la tuta mondo". Informas pri tio ESPERANTISTO SLOVAKA en sia novembra numero.

La vicministrino por Lernejoj de SSR transdonis plurajn premiojn ; unu el la ĉefaj ricevis Lernejo je la nomo de M.K. Ĉiurlionis en Vilnius, Litova SSR.

Por la ekspozicio - en kiu el 7 282 alsenditaj laboraĵoj oni instalis 518 el dek landoj - estis eldonita reprezenta katalogo kun 36 koloraj kaj 72 nigrablankaj reproduktaĵoj.

Denove estis publike rekonita la efika kunlaboro de esperantistoj, malgraŭ tio, ke iliajn servojn oni ofte bonvenigas, sed poste prisilentas, konstatas ES.

### DATREVENO DE LA PIONIRA AGO

Antaŭ 65 jaroj la ĉefa E-pioniro Ed. Kühnl komencis eldonadi en Prago "Časopis českých esperantistů". "Celo de nia gazeto", oni legas fruntpaĝe de la numero, "estas kunigi izolitajn samideanojn kaj helpi tiel organizadon de bohemaj esperantistoj". Plenumon de tiu ĉi devizo ĝi grandparte meritas ; en la j.1908 fondiĝis Bohema Unio Esperantista kaj ĈĈE fariĝis ĝia organo,aperante ĝis 1914.

Ekde sia unua paŝo la gazeto regule aŭdigis la voĉon de la malgranda ĉefa nacio inter la eksterlandaj esperantistoj, subtenante la batalon kontraŭ subpremado de la naciaj minoritatoj kaj ŝovinisma politiko de la tiama aŭstria regno.

(knl)

### DANK AL ESPERANTO ...

... ni havas multajn amikojn en la mondo. - Precize tiujn vortojn ni aŭdis dimanĉon matene 23.1.1972 el Radio Praha en elsendo, preparita de Radio Riga pri laboro de la lernejana esp.rondo "Fajrero" en Ziemeri, Latvio. En la raportaĵo, komencita per "La espero" ni aŭdis i.a. pri internaciisma helpado de la junpioniroj en "Fajrero" al infanoj en Vjetnamio, pri ilia kontakto kun la lernejanoj en Šumperk kaj kun la ĉefa esperantistino Jana Cíchová, pri ekspozicio de infandesegnaĵoj akiritaj de Fajreranoj el Ĉeĥoslovakio.

La elsendo, kvankam ĝi raportis sole pri laboro, estis serioza publika rekomendo por la Internacia Lingvo.

Ni menciu ankaŭ, ke Radio Praha 21.1. (post 22a h) sesfoje menciis esperanton en elsendo pri tradukoj de la kanto "La Internacio".

J.M.

Sendu esperantaĵojn al la letervespero en Györ 2,p.k.228,E-grupo "Verda Stelo".

## Rondeta vivo

BOR U TACHOVA - Solenan vesperon omaĝe al la 400a naskiĝtago de J.Kepler oni aranĝis 7.12.kunlabore kun la Distrikta Packonsilantaro en Tachov kun partopreno de 120 personoj. Prelegis la direktoro de la praga observatorio.

BRNO - Interesa filmvespero je aktualaj temoj okazis la 1-an de februaro. La projekciataj filmoj estis pri Sovetunio, Kubo, Sudano kaj Irlando.

GOTTWALDOV- Al plivigligo de la agado kontribuis esperantistaj vizitoj el Jugoslavio kaj Francio. Ili instigis la junajn EK-membrojn fondi propran konversacian grupon, kiu sukcese eklaboris.La gejunuloj intencas aranĝi E-ekspozicieton en la uzina klubo de sindikatoj.

JABLONEC - Kvina datreveno de EK estis bona motivo por la Jablonec-anoj por aranĝi solenan vesperon la 15an de januaro. Venis ankaŭ Esperanto-amikoj el Pollando kaj GDR.

EK en Jablonec kaj Liberec estis organizantoj de la porjunulara E-seminario en Jizerské hory (29.-30.1.)Antaŭtagmezo estis dediĉita al la prelegoj pri la internacia lingvo, posttagmezo al skiado ks.

KYJOV - EK okazigis kurson por entute 17 komencantoj. Antaŭ la kluba kunveno oni konversacias laŭ la metodo de "Paŝoj". Lastatempe vizitis la klubon kelkaj eksterlandaj gastoj, i.a. M.Hansen el Stokholmo, kiu kun granda plaĉo partoprenis ĉi tie festivalon kadre de la regiona folklora festo "Slovácký rok".

MĚLNÍK - La Zamenhofan datrevenon kaj la Tagon de E-libro (15.12.)rememoris EK ĉe ZDŠ la 21an de dec. La junaj esperantistoj kunvenis por la sama celo jam 17. 12. en la loka kulturdomo.

MÍSTEK - Ĉiun duan dimanĉon esperantistoj el diversaj lokoj vizitas "Esperanto-kafejon", kie s-ino Bartovská preparas allogajn programojn. Okaze de la datreveno de UNESCO violonludis la konata artistino s-ino Ráblová.

OSTRAVA - Malnovaj esperantistoj el Poruba kunvenas ĉiun mardon,uzante nur la Internacian lingvon. Altvalorajn prelegojn ĉiumonate prizorgas A.Stanura. Versajne baldaŭ estos fondita nova ER en Ostrava ĉe unu teresplora instituto, por kio s-ro Pěčka jam sukcesis krei kondiĉojn. - Diapozitivojn pri UK Londono,SET Dudince kaj Herbortice, Vsetín k.a.projekcias en diversaj EK s-ro V.Sládeček, Chamrádova 22, Ostrava.

PARDUBICE - La bala sezono jam kulminas... Tion konsciis ankaŭ la loka klubo, kiu kontribuis al ĝi per societa vespero la 5an de februaro en la Kulturdomo Dukla.

ŠUMPERK - Porjunularan kaj porinfanan kursojn gvidas, laŭ la metodo de A. + T. Sekelj, ges-roj Otta, Müllerová,Sittová. La konstitua kunveno de LG ČEA okazis 25.1.1972.

VSETÍN - Kurson por 15 komencantoj, precipe gejunuloj, gvidas s-ro A.Berka. Okaze de la nova jaro ER eldonis 1000 novjarajn salutkartojn kun gravuraĵoj de s-ro Borák kaj kun Esperanta teksto.

## Samideana kroniko

La 21an de nov.forpasis en Kratonohy apud Hradec Králové la konata ĉeĥa esperantisto D-ro Jan F i l i p (nask. 9.12.1911), aŭtoro de la grandaj Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta vortaroj, kiuj laŭ sia amplekso ĝis nun ne estis superitaj.

En Prago mortis 3.12. en la aĝo de 81j. Karel A d a m, emerita instruisto kaj lernejdirektoro, esperantisto de 1921.

Forpasis en januaro 80-jara Štěpánka Š u m a v a n s k á, estinta arkivistino de EK Praha.

Honoron al ilia memoro !

La konata Esperanto-poetino Eli U r b a n o v á festis la 8an de februaro sian 50-an vivjubileon. Ŝi famiĝis precipe per sia poemaro "Nur tri koloroj" eldonita de Stafeto.

Estinta revuisto de EK Praha , Emil R y b i n s k i , ĝisvivis 18.1. sepdek kvin jarojn.

Sian komunan vojon ekiris 11.12. en Šumperk la novgeedzoj Milena kaj Josef O t t a.

Al ĉiuj sinceran gratulon !!!

ĈU VI JAM RESPONDIS LA ENKETON DE STARTO EN LA 7-a NUMERO 1971 ???

*Achille Gregor*

# MANĜU KORTBIRDARON - ĜI ESTAS SANIGA !

Gardu vin, amikoj, antaŭ maljunaj meleagrinoj kaj meleagroj en emeriteco, kies viando estas rigida kiel ŝu-plandumo el plasto ! Neniam trovu placon en tio, ke vi havas meleagron kiel ĉevalon ! Vi manĝos ĝin pli longe ol ĉevalon kaj ĝumanĝos ĝin malpli ol ĉevalon. Meleagro kaj meleagrino estas plej bonaj, dum ankoraŭ ne forvelkis ilia junaĝa poleno. Dum ili ankoraŭ ne ĝisvivis la unuan jaron de sia rastema vivo kaj ilia pezo ne transpaŝis tri kvar permesitajn kilogramojn. Atentu la instrukcion - memoru, ke obezeco (2) estas nesana ankaŭ ĉe meleagroj. Se vi forgesos tion, aŭdiĝos via stomako !

En tempo, kiam ili estas dezirindaj kaj vekas niajn sopirojn, havas la meleagroj kaj ankaŭ meleagrinoj sur la kruroj epidermon molan kiel kusenetoj el paradizea plumaro; pro aĝo spertaj oldaj veteranoj havas jam la epidermon sekan, keratan (3)kaj nigriĝintan kiel Izraelidoj, kiujn Moseo posttrenis kvardek jarojn tra dezerto.

Foje mi ricevis meleagron, pri kiu la popola saĝo diras, ke ĝi vantas per sepspeca viando. Mi ne pridubis, ke mia meleagro havas almenaŭ dudekspecan viandon, ĉar tramkonduktoro agnoskis ĝin nur kiel valizon. Ĝi estis meleagrego.

Ho - kian aĉan birdon tiam mi altrenis en mian loĝejon ! Se mi estus haviginta al mi el Zverex (4) pitonon (5),kredeble, pli bone mi ĝumanĝus !

Mi ŝtopis la meleagron en paton kaj subverŝante ĝin per delikatega Sana, superdelikata margarino el vegetala graso, mi rostis ĝin en inkandeska rostujo tri horojn. Tri kubojn da vegetalino mi forkonsumis, sed el la rostujo mi eltiris nur krucoplakaĵon.

Do mi premŝtopis la abomenan kreitaĵon en kaldronon, verŝis sur ĝin tri litrojn da akvo kaj boligis ilin kaj min mem. Kiam post unu horo mi pikis ĝin,kurbiĝis mia forketo. Tio ne estis birdo, ĝi estis krokodilo.

Estas fakto, ke post certa tempo - proksimume duonon antaŭ la kvara matene -ĝi rugiĝis laŭ preskribita recepto, sed mi rajtas konjekti, ke pro hontemo super si mem. Sed la grado de dureco ne malaltiĝis. Do mi aldonis en la akvon plenmanon da sodo, ĉar mi scias, ke sodo moligas ; kaj vere - post ses horoj fandiĝis la potfundo.

Mi eltiris la pufan birdon el la poto kaj kun abomeno ĝin gustumis. Ĝi gustis kiel mato.

Mi metis ĝin sur gladotabulon kaj provis ĝin per kvinkilograma pesilo batmoligi. Post la unua bato la gladotabulo rompiĝis, sed sur la birdo estis nenio videbla. Mallumiĝis antaŭ miaj okuloj. Mi bategis ĝin per pli granda parto de gladotabulo, sed anstataŭ moliĝo, ekestis sur ĝi kaloj sur la bategataj lokoj.

Ĝi ne havis sepspecan viandon - ĝi havis eĉ ne unun. Ĝi havis malpli da viando ol pasero suferanta pro misnutrado. Anstataŭ viando ĝi havis nurajn muskolojn kaj tendenojn plektitajn el dratoj je kablo. Eble ĝi praktikis la japanan karateon.(6) Se mi estus havinta hejme aŭtogenon, mi trapikus ĝin per kurtenstango kaj ĝin kradrostigus.

Matene mi foriris en oficejon kaj kuirigis ĝin sur forno. Stuko en la kuirejo defalis pro humido, pordofarbo pro varmego foriĝis - sed la meleagro estis kiel karapaco de testudo festinta en freŝeco la ducentan naskiĝtagon.

Ĝia viando moliĝis eĉ ne malfrue vespere - ĝi splitiĝis kiel segaĵo.

Meznokte mi kapitulacis. Mi distranĉis ĝin per segilo por la fero kaj en viando--aparato diserigis. Trifoje mi devis per fajlilo akrigi la klingon. La meleagro konserviĝis ĝis nun kaj ne difektiĝis ; cetere ankaŭ, kio povus difektiĝi je ĝi? Ĝi estis difektita ankoraŭ vivanta.

La beston mi manĝis entute dekdu tagojn kaj de tiu tempo mi havas ege fortikajn makzelojn. Ĉiu opinias, ke tio estas signo de energia karaktero, sed tute ne :tion mi havas de la maĉado...

Mi havas ĝin ĝis nun. Mi prenas ĝin en saketon irante en kinejon, kaj uzas ĝin kiel maĉgumon. Ĝi ne estas tiel aroma, sed rezistas. Ĝi estas frostorezista, rezistas kontraŭ la seko kaj kontraŭ humido ; estus eble elreligi per ĝi trajnogarnituron.

Mi opinias tion, bonintence rekomendante al vi : atenton je la meleagrinoj kaj meleagroj ! Pluraj estas nedetrueblaj.
Cetere, baldaŭ poste mi eksiĝis el Ligo de best-amikoj.

(El la libro "Viroj kun antaŭtuko" tradukis Vk )

K l a r i g o j :
(1) Achille GREGOR (1910), ĉeĥa verkisto, kunlaboranto de la porhumura gazeto "Dikobraz".
(2) obeza - dikventra (PIV)
(3) kerato - supraĵa kaj korneca parto de epidermo (PIV)
(4) Zverex - organizaĵo por vendo kaj eksporto de certaj bestoj
(5) pitono - granda senvenena azia serpento (PIV)
(6) karateo - japana arto de atako kaj defendo (PIV)

---

Eli Urbanová

ROZO

Rozo strange rava
en ĝardeno kreskis:
Kiun ajn mi pensis
ĝi fermita restis

Jen vin unusolan
mi nur rememoris
kaj en la ĝardeno
rozo tuj ekfloris

---

Okaze de la IIa kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Ostrava (6.-9.5.1972) la redakcio de STARTO invitas ĉeĥajn esperantistoj partopreni

KONKURSON EN ORIGINALA KAJ TRADUKA PROZO

kiu inkluzivos rakontojn, felietonojn, humuraĵojn ks. La tradukoj estu faritaj sole el la ĉeĥaj literaturaj verkoj post la j. 1945. Ĉiuj konkursaĵoj ne superu amplekson de 60 linioj de maŝinskribita teksto, en kvar ekzempleroj !
La ĵurio* prijuĝos nur kompetentajn kaj ĝis nun ne publikigitajn laboraĵojn kaj decidos pri la tri plej bonaj en ambaŭ kategorioj. Ili estos premiitaj per la sumo de 300, 200 kaj 100 Kčs kaj transdonitaj al la venkintoj ĉe la asocia kongreso. La redakcio rezervas por si la rajton aperigi ilin en la venontaj numeroj. Limdato por la akcepto : 15. 4. 1972 !
Elprovu vian tradukistan sperton kaj kontribuu al pliriĉigo de la literatura provizo en la Internacia Lingvo !

*konsistanta el: O.Knícha1,inĝ.E.Felix,J.Vondroušek

VINTRAJ FERIOJ ĈE AMIKOJ

• Sub la aŭspicio de la organizaĵo Monda Esperanto-Turismo okazis en altmontara restadejo en Pamprovo, Bulgario, inter 3. - 9.2. tradicia Internacia Vintra Esperanto-Semajno.

• La plej juna TEJO-sekcio invitas vin al seminario en GDR (24.7.-1.8.1972).Aliĝilon petu ĉe : EK DKB, Karl-Marx-Stadt, Postfach 551, GDR.

• Interaltlerneja Scienca E-Rondo en Vroclavo, Pollando, organizas en Zakopane Internacian Vintran Universitaton de studentoj - Esperantistoj (6.-19.2.) En ties kadro okazos kelktaga seminario je la temo "Unuiĝintaj Nacioj hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ".

LA TELEVIDA STACIO de Zaporoĵje (Ukraina SSR) prezentis plurfoje programon kun honorigo al la E-sekcio en la Pedagogia Instituto, kiu organizis "Vesperon de Amikeco".

LERNOLIBRON DE ESPERANTO verkitan de J.Petrin,prezidanto de Rumana Kunordiga E-Komitatto eldonis la estraro de la universitato en Krajovo.

TRIKOLORAJ INSIGNOJ DE EK PRAHA ANKORAŬ HAVEBLAJ ĈE Ĉ E A. PREZO 7Kčs.

# Interese pri natursciencaj aktualaĵoj

Recenzas Inĝ.Eduard Felix : SENĜENAJ DIALOGOJ de Alberto Fernández. La Laguna 1971. Popularscienca serio de "Stafeto", n-ro 4, 197 p.

Por tiuj,kiuj volas esti nur plej koncize informitaj : temas pri libro, informanta per perfekta lingvo kaj en gaja formo pri la plej novaj, tre komplikaj atingaĵoj de la fiziko kaj biologio.

Nun venos verŝajne la demando : Kial dialogoj pri scienco devas esti senĝenaj ? Jes, se tia libro estus aperinta antaŭ du aŭ tricent jaroj, tiam kaj ĝia aŭtoro kaj ĝiaj legantoj povus esti ĝenataj,ekzemple de la Sankta Inkvizicio,kiu scipovis ĝeni tre efike kaj havis eĉ specialajn ĝenilojn, ekz. polekspremilojn, "hispanajn botojn" ktp. kaj fine la ŝtiparon, kiu definitive malhelpis popularigi la sciencon al G.Bruno kaj aliaj. Sed hodiaŭ la Sankta la Sankta Inkvizicio apartenas al forega estinteco, do ne povas temi pri tiaspeca ĝenado. /Preterpase : la aŭtoro A.Fernandéz, la hispano, vivas nun en Belgio, do en ekzilo, same kiel lia samlandano B.Spinozza,aŭ nia samlandano J.A.Komenio antaŭ kvaronjarmilo ! Ĉu la pasinteco estas vere tiom fora ?/.

Tamen la senĝeneco de tiuj ĉi dialogoj rilatas verŝajne alian ĝenon, nome tiun, kiu malhelpas al plenkreska viro demandi pri io,kion li ŝajne devus koni. Pro la sama kaŭzo dediĉis G.B.Shaw sian "Gvidlibron de la inteligenta virino tra socialismo kaj kapitalismo" al la virinoj, ĉar al ili li povis klarigi senĝene aferojn, kiujn la viroj ŝajnigas koni.

La dialogantoj ĉe Fernandéz estas klera oĉjo Terano kaj liaj du genevoj, 18-jara knabo Pensuto kaj 16-jara knabino Dubinja. La unua kutime prezentas iun malkovron de la moderna scienco, la dua logike deduktas ĝiajn konsekvencojn kaj la tria per ŝajne naivaj, sed propre tre sagacaj kaj ofte spritaj demandoj vidigas la problemon el diversaj flankoj. Oni ne povas diri, ke tiu legaĵo estas ripoziga, sed certe edifa kaj interesa, eĉ streĉiga. Post tralego oni komprenas, kial la Sankta Inkvizicio senkompate luktis kontraŭ disvastiĝo de la sciencaj atingaĵoj. Ĉar sur ili bazita mondkoncepto faras tiun, bazitan sur religiaj dogmoj, absurda kaj ridinda.

La libro estas provizita per klarigoj, bibliografiaj notoj kaj adekvatstilaj bildoj de J.Verwest. Havebla ĉe ĈEA. Prezo 39 Kčs.

---

VOĈOJ EL SOVETA LATVIO. Ankaŭ en tiu ĉi apudbalta respubliko soveta aperis lastjare 31-paĝa almanako kun kelkaj proz- kaj poezi-tradukoj de la latvaj aŭtoroj. Ĝi estas dediĉita precipe al la centa naskiĝ-datreveno de V.I. Lenin.

HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO.En Vilnius aperis jam la 3-a kajero de tiu ĉi interesa kaj simpatia publikaĵo. Sur 32 paĝoj ĝi i.a. prezentas novaĵojn pri la enlanda vivo, konigas onin kun la esp. disaŭdigoj de la litova radio kaj represas kelkajn nekonatajn citaĵojn de M.Gorkij pri la Internacia Lingvo. /knl/

PRELEGO, KIU VALORAS CENT PREDIKOJN

La scienca kaj teknika rondeto ĉe la fervojdirekcio (provozní oddíl ČSD) en Česká Třebová (orienta Bohemio) invitis pasintjare (15.11.) esperantiston inĝ. S e k e r e ŝ el Novi Sad prelegi pri la jugoslaviaj fervojoj.

La prelego de tiu ĉi eminenta fakulo vekis eksterordinaran atenton. Perfekta lingvo, profundaj fakaj konoj kaj reprezenta konduto lasis en ĉiuj partoprenintoj bonegan impreson. Multaj ĝis tiam dubantaj pri la kvalitoj de la Internacia lingvo, devis kapitulaci. Esperanto pruvis,ke ĝi kapablas esprimi ĉiajn fakajn nociojn. Kaj tio okazis tute sen propagando aŭ klarigado pri ĝia utileco.

Inĝ.J.Polák

## Ĉu ni konstruos nian propran hejmon?

La sopiro posedi propran bazon, kiu estus uzebla sezone aŭ dum la tuta jaro, daŭre pligrandiĝas ĉe ni. Temas unuavice pri iu centro aŭ loko, se eble konstante disponebla, kie povus renkontiĝi esperantistoj diversnaciaj kaj kie oni povus havigi al ili servojn deziratajn. Duavice, nia anaro sentas bezonon de konstanta kunvenejo, kie niaj kolektivoj povus okazigi kunsidojn, kursojn... Trie, ni bezonas propran arkivejon, bibliotekon, ekspoziciejon.

Tiun tendencon bone komprenis la esperantistoj el Bor, kiuj aĉetis domon por sia EK. Ili planas disponigi ĝin ankaŭ al eventualaj eksterlandaj vizitantoj.

Ni povas kun ĝojo konstati ankaŭ la ĉiuflanke kreskantan intereson pri SET Lančov, la entrepreno deveninta el Třebíč. La tuta ĉs. esperantistaro povas fieri pri ties rezultoj. Konstante kreskas kompreno por ĝi kaj en tiu ĉi jaro tio montriĝos espereble ankaŭ per pli signifa financa subvencio.

Simile en Slovakio oni nun planas disponigi al la movado eble tutjaran montaran refreŝigejon.

Nia SET kompreneble ne povas plenumi ĉiujn postulojn de la centro esperantista. Eĉ longjaraj kunlaborantoj de SET subtenas serĉon de nova, alispeca bazo. Nia anaro, kunlabore kun niaj asociaj reprezentantoj, devus serĉi prefere tian, kiu servus kaj al la turismaj kaj al la klerigaj aŭ organizaj celoj. Ne posedante sufiĉajn monrimedojn, ni povus efektivigadi niajn planojn nur paŝon post paŝo. Evidenta sukceso de multjara kaj ĉiam perfektiĝanta okazigado de SET fidigas realigeblon de plua entrepreno.

La supre menciitajn celojn plenumus ekzemple adaptigo de malnova muelejo en centra Bohemio, apud la urbo Příbram. Avantaĝoj : ĝi troviĝas sur propra grundo, ĉirkaŭita de ĝardenoj, herbejoj kaj paŝtejoj (2,5 ha) apartenantaj al la sama posedanto. Ĝi situas en apudarbara valo, unu kilometron de banejo, apud ŝoseo, 2 km de la urba centro kaj de la kulturdomo, 3 km de la fervojstacio. Malavantaĝoj : multekosta adaptigo, elektra fluo en distanco de 700 m.

Se ekzistas en niaj vicoj sufiĉe da entuziasmuloj, kiuj kun plena konscio ekagus por realigi la projekton, tiam ni certe bezonus helpon de nia anaro, ne nur financan, sed ĉefe konstruan.

La junulara sekcio jam montris intereson pri la afero, nun oni atendas iniciaton kaj konkretajn paŝojn de ĉiuj, kiuj povas kaj volas kunlabori.

(kr)

---

### PLI DA ZORGO POR LA LINGVO !

En Babilono (okcidenta Bohemio), kie pasintjare okazis Dua laborkonferenco de la Pedagogia sekcio de ĈEA, niaj plej spertaj esperantistoj konstatis, ke la lingva nivelo de niaj anoj estas ofte senbezone difektata ne pro nescio, sed pro malatento, sekve de malofta uzado de la lingvo. Estas interese, ke se niaj samlandanoj aŭdas alilandan e s p e r a n t i s t o n pekanta kontraŭ alia regulo de la Fundamento, ol ili mem, ekz. ukrainanon dirantan "djika ĥomo", nederlandanon dirantan "mi cias, ke mi hafas defon", aŭ japanon dirantan "kvelero kun kernelo", ili tuj tion rimarkas kaj akre kritikas. Tamen la "ni rigardis soldatoj" (= koukali sme na vojáci) el la buŝo de ĉeĥo ilin ne incitas.

Surbaze de tiu ĉi sperto la Lingva Komisiono de ĈEA invitas ĉiujn ER kaj EK elekti el siaj anoj la l i n g v a n g a r d a n t o n, kiu zorgos :

1. Ke oni eluzu ĉiujn kunvenojn kaj renkontiĝojn por praktikado de la lingvo.

2. Ke ĉiu eraro, ĉefe tiu, kiu ripetiĝas, estu dece kaj delikate korektita.

3. Se li puŝos al malfacilaĵoj , ĉu societaj, ĉu lingvaj, li turnu sin skribe aŭ persone al la sekretario de la LK inĝ. Eduard F e l i x, Praha 3, U Vinohradské nemocnice 10, tel. 7377227.

### INTERNACIO en Esperanto

La Mezbohemia Eldonejo kaj Librovendejo /Středočeské nakladatelství a knihkupectví/ eldonis en 7 000 ekzempleroj belan libreton tolbinditan /7,5 x 7,5 cm/ kun la titolo "Internacionála". Ĝi enhavas la tekston de la Internacio en 31 lingvoj, i.a. ankaŭ en Esperanto. La tekstoj estas kompilitaj laŭ la hungara eldono.

# Okénko do sekretariátu

Konec roku je vhodnou příležitostí k hodnocení a proto uveřejňujeme alespoň stručný přehled o stavu členské základny svazu. • Do 31. prosince 1971 bylo vydáno celkem 2.688 členských legitimací, platících členů bylo ke stejnému datu 2.349. • Složení podle kategorií je následující: A - 894, B - 578, C - 33, D - 209, E - 635. Poslední kategorie /E/, jsou přispívající členové, t.j. příznivci našeho hnutí. Je proto velmi neradostné a nesvědčí to o naší dobré práci, když mezi těmito členy je hodně aktivních esperantistů ! • S ohledem na skutečnost, že podle stavu platících členů k 31. III. 1972 bude stanoven počet delegátů 2. sjezdu, obdrží Starto č. 2/72 pouze ti, kdož budou mít členství zaplaceno. Splňte proto svoji členskou povinnost co nejdříve!

<u>Přehled MS a EK podle počtu platících členů /k 31. 12. 1971/:</u> Praha - 303, Paskov - 118, Třebíč - 104, VŽKG Ostrava - 97, Roudnice n/L. - 92, Brno PKO - 87, Mělník - 85, Kopřivnice - 63, Vsetín - 55, Č. Třebová - 48, Třinec - 45, Č. Budějovice - 43, Olomouc - 43, Pardubice - 42, Tábor - 39, Plzeň - 37, Hr.Králové a Ústí n/L.- 32, Opava a Poděbrady - 31, Žďár n/S.- 30, Mor. Budějovice - 28, Jablonec n/N.-27, Gottwaldov, Kolín, Liberec, Písek a Stonava - 26, Polička a Poruba - 23, Bučovice a Hranice - 21, Svitavy a Teplice - 19, Šumperk a Znojmo SZTŠ - 18, Příbram - 16, Náchod - 15, Havířov, Havl. Brod a Hořice - 14, Vyškov - 14, Brno I.B., Jihlava ZV a Miletín - 13, Místek - 13, K. Vary, Lanškroun a Most - 12, Č. Dub, Jihlava DK, Kladno, Kyjov a Ostrava ČSD - 11, Příbor - 10, Frýdlant, H. Počáply, Přerov a Trutnov - 9, Č. Lípa, Jaroměř, Měst. Králové, Ml. Boleslav a N. Jičín - 8, Králíky, Praha ČSD, Turnov a Žamberk - 7, Boskovice, Hodonín, Ostrov n/O., Semily a Sokolov - 6, Č. Třebová SPŠŽ, Děčín, Lichnov, Litoměřice, Litomyšl a Slavkov - 5.

<u>Podporující členové ČES v r. 1971 /pokrač./:</u> J. Hrdina, A.Lauterbach a J. Loub.

<u>Dary na ediční fond ČES:</u> J.Kopřiva 10.-, M.Stanzelová 10.-, Z.Bartošová 20.-, neznámý dárce 120.-, A.Eineigel 20.-, O.Nesnídal 10.-, Fr. Svačina 24.-, J. Tengler 10.-, arch. Drlík 1.000.-, E.Dudek 40.-, ing.J.Doležal 10.-, L.Vašáková 12.-, J. Zdrha 12.-, ing.M.Levá 12.-, EK Lanškroun 22.-, J.Tylš 12.-, J.Dominik 50.-, A.Satínský 12.-. Celkem získáno za rok 1971 na darech 4.557.- Kčs. Děkujeme srdečně všem dárcům i podporujícím členům za jejich obětavost a věříme, že jejich řady se i v letošním roce rozrostou.

<u>Do seznamu MS a EK si doplňte:</u> Klub esperantistů Kraslice, V. Papež, Družstevní ulice č. 20, Kraslice, okr. Sokolov.

## NA POČEST SJEZDU

Blížící se II.sjezd ČES by měl být vzpruhou pro naše EK ; nestačí však jen vybrat kandidáty do ÚV a zvolit delegáty na sjezd, či provést výroční členské schůze a podat o nich zprávu. Od kroužků se n a v í c očekává, aby závazky přispěly :

1. K rozšíření členské základny svazu
2. K veřejně prospěšným akcím v oblasti vzdělávací, vydavatelské ap.
3. K propagaci své vlasti v zahraničí - družebními styky, mírovou prací a účastí v různých akcích (evropská konference, Vietnam ap.).

Ani jeden náš člen a čtenář tohoto časopisu by neměl při tom chybět !

Bližší informace naleznete v INFORMACÍCH č.1/72 rozeslaných všem MS a EK !

## CO JE TŘEBA VĚDĚT k cestě na Maďarský kulturní festival ?

Protože pořadatelé požadují zaplacení příspěvku 240 Ft. předem, předloží zájemci j e d n o t l i v ě výjezdní doložku a celní prohlášení místní pobočce SBČ, kde si vyžádají formulář "Úhrady do ciziny" (s červeným pruhem). Tuto žádost vyplní a po potvrzení EK k ní připojí program MKF s přihláškou a předloží ke schválení SBČ. Po úhradě příspěvku pak zašlou přihlášku do 1.6.72 na adr. HEA, Budapest 5, p.f. 193.

Oni akceptas ankoraŭ kelkajn abonojn de HEROLDO DE ESPERANTO por 1972, ankaŭ por amikoj en aliaj netranspagipovaj landoj. Jarabono 61 Kčs. Informiĝu ĉe: Ivo Železný, p.k. 7, Praha 56.

SOMERA ESPERANTO - TENDARO en Lančov, Ĉeĥoslovakio, tiu ĉi grava eduka aranĝo eniras ĉi jare jam la 20-an sezonon. Romantika situo apud la "Arĝenta Golfo" de la sudmoravia rivero Dyje kaj altnivela programo postlasas neforgeseblajn rememorojn ĉe ĉiuj tendaranoj, kies nombro superas lastatempe jam 300 personojn.

Programo de la unua /16.-29.7.1972/ kaj dua /30.7.-12.8./ etapoj inkluzivas Esperanto-kursojn A-por komencantoj, B-por progresintoj, C-konversacian kaj D-por instruistoj de la Internacia Lingvo ; krome unu tuttagan kaj du duontagajn ekskursojn.

Loĝado en tendoj po du personoj, parte en malgrandaj kabanoj, manĝado kvinfoje potage. Banado, sportludoj, vesperoj ĉe tendarfajro k.a. La prezoj relative malaltaj.

Eksterlandaj gastoj bone parolantaj Esperanton estas bonvenigataj !

---

SITNO INVITAS ESPERANTISTOJN. La turista ripozkabano sur la monto Sitno, Slovakio estas jam je la dispono al esperantistoj, kiel sciigas s-ro Váňa el Dudince. Belega regiono, 1011 m supermara alteco, vintre bona skiad-tereno kun ski-trenilo kaj la loĝigo por 15 Kčs garantias agrablan restadon. Vojaĝo al Sitno : rapidvagonare al Hronská Dúbrava, de tie vagonare al Banská Štiavnica, poste aŭtobuse 8 km al Počúvalské Jazero, de kie oni atingas la monton post 45-50 minutoj.

RIPOZE SUR LA INSULO "ESPERANTO". Sur Danubo, oriente de la bulgara urbo Orjaĥovo troviĝas la insulo ESPERANTO, sur kies bordo staras duetaĝa turista domo kun restoracio kaj la kampadejo -ambaŭ nomitaj "Esperanto - por 120 en- kaj eksterlandaj turistoj. La prezoj estas moderaj. Restadeblecoj inter 21.7-4.8.; 6.-20.8 ; 21.8.- 4.9 ; aŭ 6.-20.9. La ĉeĥaj interesatoj informiĝu ĉe : Ludvík Železný, Ledečská 716, Havlíčkův Brod.

INTERNACIA TURISTA RENKONTIĜO-FESTIVALO en Szeged okazos - jam la dekan fojon - de la 24a de julio ĝis la 30a de aŭgusto. Limdato por aliĝo estas 1.6.1972 ĉe la vojaĝoficejo "Volanturist", Emeriko Székely, Hungario, Szeged, Szivárvány str. 29. La prezoj inter 900 kaj 1100 forintoj.

• POLA RADIO, Esperanto - -fako volonte dediĉos ankaŭ venonte lokon en siaj "Esperanto-ekspresoj" por interesaj iniciatoj kaj aranĝoj de la E- rondetoj en Ĉeĥoslovakio, se ĝi nur estos ĝustatempe informita.

• LA PLEJ VENDATAJ LIBROJ en FRG estas - laŭ la statistiko de la libroservo Pickel - "Poŝatlaso de la mondo", "Bona ŝanco" (W.Bormann), "Paŝoj al plena posedo" (W. Auld), "Plena Ilustrita Vortaro", "Senĝenaj dialogoj" (Fernández), "Vole... nevole" (R.Schwartz), "Metodiko de la E-instruado" (Rakuŝa).

• EN POLA NEOFILOLOGIA SOCIETO en Szczecin fondiĝis apud la angla, germana, franca kaj rusa sekcioj ankaŭ la Esperanta, kiel samranga.

• LA UNUAN INTERVJUON pri Esperanto elsendis la 28an de novembro 1971 la egipta radio.

• DUM TRI SEMAJNOJ, de la 16a de novembro ĝis la 5a de dec. 1971 oni ludis en Parizo ĉiuvespere (escepte de lundo) esperantlingvan teatraĵon "La Reto" de Bukar en la teatro "Absidiole".

• NOVA ESPERANTA FALDFOLIO de Mannheim senpage havebla ĉe ESPERANTO, D-68 Mannheim 1, T 6/18, FRG.

• RUDOLF BURMEISTER, aktiva esperantisto el GDR estis honorigita per la Johannes R.Becher -medalo pro grandaj meritoj en la Germana Kulturligo.

(El: Heroldo, Pilo-Press)

## S L O S O V A C Í   L I S T I N A

slosovatelných knižních poukázek ČES

Dne 8. prosince 1971 bylo v sekretariátě svazu veřejné slosování prodaných knižních poukázek. Z celkového počtu 1600 ks bylo prodáno 1421 ks. Tažena byla tato čísla:

1. cena - tranzistorové rádio - poukázka č. 1253
2. cena - bezplatný pobyt v Lančově -"- č. 604
3. cena - náramkové hodinky - -"- č. 839
4. cena - skládací deštník - -"- č. 151
5. cena - aktovka - -"- č. 189

6.-10. cena - esp. gramodeska: č. 270, 386, 588, 1110 a 1470;
11.-25. cena - sada esp. odznaků: 1, 310, 328, 462, 570, 696, 711, 712, 808, 1128, 1223, 1233, 1262, 1317 a 1434;
26.-50. cena - esp. publikace a odznaky v ceně 10.- Kčs dle vlastního výběru výherce: 20, 32, 168, 178, 285, 307, 322, 381, 503, 579, 706, 733, 747, 786, 1139, 1184, 1226, 1251, 1279, 1365, 1366, 1369, 1378, 1476 a 1517;
51.-100. cena - esperantské publikace a odznaky v ceně 5.- Kčs dle vlastního výběru výherce: 74, 102, 105, 144, 160, 173, 177, 197, 204, 215, 248, 249, 262, 279, 291, 327, 338, 421, 490, 562, 650, 660, 666, 695, 704, 708, 713, 716, 765, 876, 1060, 1089, 1118, 1119, 1120, 1182, 1192, 1202, 1222, 1259, 1273, 1284, 1308, 1324, 1374, 1382, 1457, 1532, 1561 a 1573.

Výhry budeme odesílat nebo osobně předávat ihned po předložení vylosované poukázky.

Poukázky budeme vyměňovat do 31. března 1972. Po tomto datu propadají nevyměněné poukázky ve prospěch svazu.

Postup při výměně poukázek:

1. Na zadní stranu poukázky napište zřetelně svoji adresu!
2. Poukázky zašlete na adresu svazu - pošt. schránka 8, Praha 2 a přiložte objednávku publikací a odznaků, které chcete za přiložené poukázky vyměnit. Objednávejte vždy za vyšší částku - rozdíl doplatíte složenkou! Počítejte 2.- Kčs na balné a poštovné.
3. Při výběru použijte nabídku ČES, která byla přiložena k Informacím předsednictva č. 3. Slevy nebudou při výměně poskytovány.

---

**PORINFANAJN LERNOLIBROJN** el la tuta mondo kolektas Pedagogia Sekcio de ĈEA por fondi propran bibliotekan angulon, sed ankaŭ por stud-celoj. Proponantoj bv. mencii deziratan formon de repago, ekzemple en libroj eldonataj en nia lando. La interŝanĝojn peras Karel Kraft, Obořiště 107, okres Příbram.

**GRAVA ATENTIGO DE LK ĈEA !** Antaŭ ol transdoni ion por publikigo aŭ publika elmontro oni turnu sin nepre al la Lingva Komisiono de ĈEA (Vuk Echtner, Díly 78, p. Postřekov, okres Domažlice, aŭ adr. de ĈEA).

---

ŜANĜOJ EN LA SEKRETARIEJO DE ĈEA. S-ino L.Klegová, oficistino de ĈEA, forlasis fine de januaro 1972, je sia propra deziro (urĝaj personaj kaj loĝejaj problemoj) sian postenon.

La estraro de ĈEA dankas ŝin pro la oferema laboro, farita dum malfacilaj cirkonstancoj kaj deziras al ŝi sukcesojn en la nova laborloko kaj en la plua agado poresperanta.

La taskoj de la sekretariejo de ĈEA, kiuj notinde ampleksiĝis konekse kun la kongres-preparoj, solvas la estraro provizore pere de administra helpo.

ĈK ĈEA akceptos oficistinon daŭre loĝantan en Praha, kaj scipovantan maŝinskribi. Scipovo de Esperanto bonvena !!

# Korespondi déziras

SOVETIO - Kontaktojn kun ĝemeliĝinta urbo Ostrava k.a. serĉas Interklubo, Artema 98,Doneck 340050, Ukrainio • Vladimir KASSJANĈIK d.34, kv.20, 343871, Avdejevka 3, Doneckaja o. Pri kinoarto, turismo ks. • D-ro Jaroslav MATVIJIŜYN, Kiev-1 do vostr. Pri historio de matematiko kaj ciela mekaniko. • I.G.REZNIĈUK, maŝinkonstruisto, 310011, Ĥarkov, Torgovaja 80 , pri E-movado, politiko • Anatolij DOVBIŜ, 245110 Ŝostka, Sumskoj obl.,Glavpoĉtamt do vostr, kol.b.k. en tri dimensioj • A.N.BOGDANOV, 39j.kuracisto-infektologo, Kiev-3,do vostr. • Edgard ĤOMIĈ, K. Libknechta 189,kv. 49,Krasnodar 40 , litaraturo,fotoj • A.MELNIKOV 20j.stud.,ab. jaŝĉik 233, Rostov-Don-7, pri E-movado, popolaj moroj,moralaj problemoj ktp. • V. ŜIŜKIN,abon. p.k. 33,Barnaul - 99-656099,interŝ.librojn kaj sondiskojn • Kalju LILLEPUU, 36j.instruisto, 202 900 Viljandi, Ranna pst. 4, Estona SSR.

BULGARIO - Jordanka NIKOLOVA (vd.foton) 25j.akuŝistino,str."Neofit Bozoeli" 18, Kjustendil • Simeon BALTAĜIEV, Bjala,distr.Ruse, pri č.t.,interŝ.revuojn • Stojan ŜOPOV, teknikisto,str. D.Gruev 16, Targoviŝte • Cvjatko TODOROV, 36j. teknikisto, Ŝumen p.k. 60 ; vojaĝado, E-aĵoj • M.A.GEORGIJEVA 15j.,"Kolju Fiĉeto" 6, Bjala, Ruse • E.I.PETROV, 30j.,SOFIO, kv.Ĥr.Smirnenski ,str.149,n.13,interŝ. anekdotojn, humuraĵojn • Ivaniĉka STEFANOVA 13j.str. A.Stambolijski 31,Bjala,distr. Ruse. • Korespondamikojn serĉas lernantoj 10-15j. de la Gimnazio "D.Blagoev", Dospat - ok.Smoljanski(E. Ĉirpanski, prez.de E-societo "Fajrero") • Gejunuloj 12-16j. el Dve Mogili,distr. Ruse (kursgvidanto N.R.NEJKOV).



POLLANDO - Barbara MIKUŁOWSKA 25j. inĝ. de ĥemio, Nowa Sól,Sienkiewicza 13,pri literaturo,sporto,turismo,muziko,teatro • Eva EWERT, Chelmza, Nowotki 22,pow. Toruň • P.SKRYTKA, 36j,Toruň 1 p.f.16 • Ivone BOROWICZ 22j. Poznaň-3, Dzierzyňskiego 22m 9,pri sporto,muziko, turismo • A.MARSZAŁKOWSKI,p.f. 254,Gdaňsk 1 • Jadwiga BOCHNIAK , Lublin, ul. Zytnia 3/5 • Gekorespondantojn por 30 geknaboj 11-15j. serĉas ilia instruistino M.WILCZINSKA, Obotrycka 22/3, Szczecin - 33.

HUNGARIO - József POÓR, Szombathely,str. Szüscsapo 26/D. Kun knabino,kiu kolektas p.m. • RUMANIO - Ernest Schlesinger, 62j. librotenisto,p.k. 35, Cluj - 1, spec. kun Prago, Bratislavo.

---

SDĚLENÍ REDAKTORA STARTA

Za uplynulé tři roky (viz rejstřík v č. 8/71) se nám podařilo navázat kontakt s necelou polovinou MS a EK v českých zemích. Postrádáme také zprávy z mládežnické, technické a některých dalších odborných sekcí svazu.

Někteří čtenáři nám mají za zlé, že STARTO přináší méně beletristického materiálu než např. Esperantisto Slovaka a j. Zapomínají, že "Starto" je především orgánem svazu a že tudíž plní úkoly poněkud odlišné než tzv.literární časopis.

V tomto roce uplyne 85 let od vzniku esperanta a 55 let od úmrtí jeho tvůrce. Doporučujeme všem MS a EK,aby využili těchto výročí a rovněž příležitosti,kterou poskytuje připravovaný II.sjezd ČES k informacím i dotazům na sdělovací prostředky, případně aby se vhodnou formou dožadovali zavedení esp.rubrik v denících, časopisech a jinde.

A na závěr ještě prosba : pište své zprávy a články pro svazový časopis esperantsky !

O.Knichal

---

LA ESTRARO DE ĈEA KAJ LA REDAKCIO DE STARTO DANKAS PRO LA MULTNOMBRAJ SALUTOJ VENINTAJ EN LA ASOCIAN SEKRETARIEJON OKAZE DE LA NOVA JARO.

---

STARTO - eldonas Ĉeĥa E-Asocio, p.k.8, Praha 2. Aperas dufoje kvaronjare. Respondeca redaktoro Oldřich K n í ch a l. Redakta komitato : inĝ. Eduard Felix,Jaroslav Mařík, inĝ. František Sviták. Abonebla sole por la membroj de ĈEA. Dohlédací pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen ŘP Praha j.zn.P/1-2283/1971, dne 6.5.1971.